

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj

redakcie

Karaj legantoj!

La distanco inter la 4-a kaj 5-a numeroj okazis iom pli longa ol kutime pro la foresto de la redakcia teamo kaj partopreno en la 83-a Universala kongreso de UEA en Montpeliero, Francio. La raporton pri tiu evento legu en la sekva numero.

Ni daŭrigas temon "Esperanto en radiofonio". La redakcio de Ĉina Radio Internacia afable prezentas sin por KOMENCANTO.

Redaktoro de la plej konata porjunulara revuo KONTAKTO Sabira Stahlberg rakontas pri ĝi.

En la gramatika parto tre gravaj momentoj pri artikolo "la".


Familia rakonto de Florian nad Metuji el Nederlando.

Litova fabelo de Aleksas Masiukas.

KOMENCANTO lanĉas konkurson de enigmoj, ĉi-numere librobreto de Janaljeva Zuhra, Kazahio.

Kaj krucvortenigmo de Stanislav Kacko, Kurgan.

Tradiciaj anekdotoj kaj korespondadreso sur la lasta folio.



(Oleg Demjaŝev)

Oleg

KOMENCANTO

1998 numero 6
fondita en 1992
8 numeroj jare
redaktas kaj eldonas: Viktor
Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto:
Rafija Jafasova
adreso: 620041, Ekaterinburg,
ab. ja. 132, Ruslando
abontarifo por 1998:
internacia tarifo:
24 nederlandaj guldenoj aŭ 12
usonaj dolaroj
orienteŭropa kaj latiname-
rika tarifo:
10 usonaj dolaroj
aŭ por ĉiuj — 15 IRK
konto ĉe UEA: **Vkud-a**
ruslanda tarifo:
32 рубля (за 8 номеров в
год) простым почтовым пе-
реводом на имя Кудрявцева
Виктора Васильевича:
620041, Екатеринбург, аб.
ящ. 132

**PERANTOJ de
KOMENCANTO**

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas
aboni nian gazeton

CERIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1,
CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE
— 0012, Tallinn

ITALIO

Višnja Branković, Via Leghissa
6, IT-34131 Trieste

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul.
Broniewskiego 77-137,
PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra
Rörum pl 455; SE — 24294
Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im
Schleedorn 6, CH — 4224
Nenzlingen

UKRAINIO

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307,
UA — 310003, Ĥarkiv

Historiaj studoj de Σ

Esperanto en radiotondio



China Radio International
中国 国际 广播 电台

*Estimata kolego,
ĉi-kune ni sendas al vi rikolon pri es-
peranto-elsendoj de Ĉina Radio Inter-
nacia kaj antaŭdankas vin pro ĝia
aperigo.*

(Esperanto-redakcio Ĉina Radio In-
ternacia)

Esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio
Internacia estas aŭdebla en pliparto de
la mondo. Tion confirmis leteroj el pli ol
60 landoj kaj regionoj de la kvin konti-
nentoj.

En Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio
Internacio laboras 10 esperantistoj ju-
naj, mezaĝaj kaj maljunaj. Ni plenumas
ĉiujn aferojn bezonatajn de la
disaŭdigo, de Esperantigo de novaĵoj,
komentoj kaj diversaj artikoloj al paro-
lado, redaktado, intervjuado, kore-
spundado kaj manipulado de kom-
putero por disaŭdigo. Ni amas nian
aferon kaj volas dediĉi nian tutan forton
al Esperanta disaŭdigo de Ĉinio. Ni
kore dankas al vi ĉiuj, ĉar en la pasin-
taj jaroj vi multe subtenis nin per viaj
leteroj kaj senditaj periodaĵoj, raporto-
j, informoj, libroj, diskoj, kasedoj kaj tiel
plu. Ni sincere petas vin, ke vi divers-
maniere kunlaboru kun ni kiel antaŭe,
skribu al ni viajn opiniojn kaj kritikojn,
por ke ni senĉese perfektigu nian labo-
ron.

Ĉina Radio Internacia estas sen-
dostacio de Ĉina Popola respubliko al
aliaj landoj. Antaŭe ĝi estis nomita Ra-
dio Pekino. Ĝi faras disaŭdigon en 38
fremdaj lingvoj, la komuna lingvo de
Ĉinio kaj 4 ĉinaj dialektoj. Esperanta
disaŭdigo estas unu el tiuj disaŭdigoj.

La Esperanta disaŭdigo de Ĉina
Radio Internacia komenciĝis la 19-an
de decembro 1964. En la unuaj
monatoj ĝi direktiĝis nur al Eŭropo,
dufoje en ĉiu semajno, duonan horon
ĉiufoje. En aprilo de 1965 ĝi estis el-
sendata ankaŭ al Japanio, Koreio kaj
Sudorienta Azio; ekde oktobro de
1980 ankaŭ al Latinameriko.

La Esperanta disaŭdigo de Ĉina
Radio Internacia konigas la sintenon
kaj vidpunktojn de la ĉina registaro kaj
la ĉina popolo pri gravaj internaciaj
problemoj; la reformadon kaj malfer-
mon de Ĉinio; atingojn de la moder-
niga konstruado de Ĉinio; ĝiajn histo-
rion, geografion, kulturon, sociajn
morojn kaj popolajn kutimojn kaj tiel
plu; kaj ankaŭ la Esperanto movadon
de Ĉinio kaj aliaj landoj por profundigi
la interkomprenon kaj amikecon kaj
protekti la mondan pacon.

La Esperanta disaŭdigo de Ĉina
Radio Internacia konsistas el novaĵoj
ĉiutage, komentoj de lunde ĝis ven-
dredo, kaj jenaj regulaj programeroj
respektive:

Lunde: "Leterkesto"

Mardo: "Vojaĝo en Ĉinio"

Merkredo: "Ĉina kulturo"

Ĵaŭdo: "Pri Ĉina Ekonomia"

Vendredo: "Socia vivo"

Sabato: "Esperanto en Marŝo" kaj
"Literatura Programero"

Dimanĉo: "Tra la Mondo" kaj
"Muzika programero".

*Redakcio de KOMENCANTO dankas la
redakcion de "ESPERANTO-REDAKCIO DE
ĈINA RADIO INTERNACIA" kaj invitas la
legantojn al la paĝo 7, kie ni publikigas
horaron de radioelsendoj de ĈRI.*

La redakcio danke akceptas
donacojn por prospero de
KOMENCANTO kaj Esperanto-
movado

La sekva numero de
KOMENCANTO aperos
la 15-an de septembro
1998

tejo

KONTAKTO

Interesa fakto el KONTAKTO

La Historio De La Alumeto

tradukis Zoran Ciris, Serbio

Kiam ni bezonas fajron, ni simple prenas alumeton kaj ekbruligas ĝin. Sed la alumetoj ne ĉiam estis tiaj, kiaj ni ilin konas. Tra la tempo ili sanĝigadis kaj pliboniĝadis. Iam estis uzataj alumetoj, kiuj estis vere danĝeraj por homoj, ĉar ili povis tre facile ekbruli. Iuj eĉ estis venenaj.

La unuaj alumetoj, tiaj, kiaj ni konas ilin, estis produktitaj antaŭ nur cent jaroj. Temis pri longaj *vergetoj*, (bastonetoj-*k*) sur kies unu fino troviĝis la "kapo". Tiu kapo ekbrulis per sulfata acido, do la homoj devis kunporti ankaŭ tiun fluajon. Pli poste oni anstataŭis tiujn alumetojn per novaj kun fosfora pinto.

La eco de fosforo estas ke ĝi ekbrulas eĉ je plej malgranda frotado. Tiu ĉi eco estis eluzita antaŭ cent jaroj por la produktado de alumetoj. Sed fosforo estas tre toksiga. En alumetfabrikoj mortadis la laboristoj grandnombre post kelkaj jaroj.

Pli malfeliĉe estis ke en tiuj fabrikoj laboris 10-ĝis 14-jaraj infanoj, kiuj nur post iom da tempo malsanis kaj mortis.

Ankaŭ ĉar fosfora alumeto estis tiom rapide bruligebla, ĝi ne estis bona por ĉiutaga uzado. La kemiistoj komencis serĉi pli taŭgan materialon por alumeta pinto. Fine ili faris *alĝon* (miksajon) el kalio-klorito kaj sulfuro kun aldono de pistita kreto. Por ke alojo pli bone aliĝu al la vergeto, estis aldonita gluaĵo. La flankoj de la alumeta skatolo estis ŝmiritaj per simila alojo, kun la diferenco, ke tiu alojo enhavis ankaŭ iom da ruĝa fosforo. La ruĝa fosforo ekestas per varmigo de blanka fosforo je temperaturo de 300 gradoj en senaera spaco, ĉar en aero fosforo ekbrulas jam je 50 gradoj.

Per frotado de la flankoj de la skatolo, la oksigeno el kalio-klorito liberiĝas kaj tuj ekbruligas la ruĝan fosforon sur la skatolo. La fajreto de tie transiras al la pinto de la alumeto, kio bruligas la sulfuron kaj tuj poste ankaŭ la vergeton. La vergetojn oni ellaboras el facile ekbruligeblaj lignoj (abio, pino ks). Hodiaŭ ekzistas diversaj specoj de alumetoj. Iuj eĉ estas faritaj el paperoj trempitaj en vakso. ☺

KONTAKTO 2-1998 (164)

Kontakto estas revuo kun tre belaj bildoj kaj interesaj artikoloj. *Kontakto* estas unu el la plej multe legataj kaj ŝatataj revuoj en Esperanto, kaj unu el la plej belaj. Ĝi aperas ses fojojn jare.

En *Kontakto* vi trovos artikolojn specialajn pri gravaj temoj; literaturaĵojn, konsilojn, raportojn, ludojn, rakontojn kaj multon alian. La enhavo de *Kontakto* estas tre diversa. La artikolojn verkas Esperantistoj el la tuta mondo, plej ofte gejunuloj.

Jam *Kontakto* havas 35 jarojn, sed ĝi estas tre junuleca, ĉar *Kontakto* estas la revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (eldonas ĝin Universala Esperanto-Asocio). Nuntempe *Kontakto* produktiĝas en Bulgario.

Kontakton legas homoj en pli ol 92 landoj en la mondo. Ne nur homoj, kiuj bone scias Esperanton, legas *Kontakton*. Ankaŭ personoj, kiuj ankoraŭ lernas Esperanton, aŭ antaŭ nelonge komencis studi la lingvon, povas legi *Kontakton* sen problemoj. En *Kontakto* ekzistas artikoloj ankaŭ *facilaj* kaj *tre facilaj*. Tiun ĉi informon pri *Kontakto* ekzemple vi legas en facila lingvo.

Se vi volas ricevi *Kontakton*, petu informon ĉe *Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando*.

Se vi volas skribi artikolon aŭ verki por *Kontakto*, sendu ĝin al *D-ino Sabira Ståhlberg, p.k. 405, BG-VARNA, Bulgario*.

En RUSLANDO vi povas aboni KONTAKTON kontraŭ 72 rubloj Gerecka Halina Romanovna, 620014, Ekaterinburg, ab.ĵa. 162,

ARTIKOLO

la

Artikolo *la* kaj ĝia apliko

Artikolo "la" nepre uzeblas:

1. Kiam oni parolas pri objekto, kiu estis menciita almenaŭ 1-foje

Tio estas libro. La libro estas nova.

2. Se klaras el situacio, pri kio nome oni parolas:

Donu al mi la libron. Mem scias kiuni

3. Antaŭ substantivoj, kiuj signifas solan en sia speco objekton:

la suno, la luno, la tero, la mondo.

4. Kiam oni povas anstataŭi "la" per poseda pronomo:

Mi lavas la manojn--mi lavas miajn manojn.

5. Antaŭ substantivoj, kiuj estas konkretigataj:

Mi lavas la plankon de mia ĉambro.

6. Antaŭ la ordaj, ordumaj numeraloj:

La kvina numero de "KOMENCANTO" La dudek sesa de julio.

7. Kiam oni parolas pri objekto, kiu prezentas la tutan grupon, klason, specon:

La homoj havas du piedojn; la angloj loĝas en Anglio; la bestoj estas animaloj.

8. Antaŭ la komparaj adjektivoj:

Somero estas la plej varma sezono.

9. Antaŭ nomoj de horoj kaj ties partoj:

Je la duono post la kvara; je la kvarono antaŭ la tria.

rimarkoj:

— "la" necesas uzi, se anstataŭ ĝi eblas uzi montran pronomon "tiu":

La libro estas nova=tiu libro estas nova

— kiam kelkaj substantivoj sekvas unu post la alia, ne necesas uzi la artikolon "la" antaŭ ĉiu el ili:

La libro, plumo kaj kajero kuŝas en teko



L. M. Zamenhof

LINGVAJ
RESPONDOJPri la uzado de la artikolo

Tute vane vi faras al vi multe da klopodoj kun la uzado de la artikolo. Vi devas memori, ke en nia lingvo la uzado de la artikolo ne estas deviga; sekve la plej bona maniero de agado estas jena: uzu la artikolon tiam, kiam vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa kaj postulata de la logiko, sed en ĉiuj *dubaj* okazoj tute ĝin ne uzu.

Pli bone estas ne uzi la artikolon en tia okazo, kiam ĝi estas necesa, ol uzi ĝin tiam, kiam la logiko kaj la kutimoj de ĉiuj popoloj ĝin malpermesas. Se vi ekzemple diros: "venis tago, kiun mi tiel longe atendis", via frazo estos ne tute bonstila, sed ne rekte erara, kvankam oni devus tie ĉi diri "*la* tago"; sed se vi diros "hodiaŭ estas *la* dimanĉo" anstataŭ "hodiaŭ estas dimanĉo", tiam vi faros rekte eraron, kiu estos malagraba por la oreloj de ĉiu bona Esperantisto.

respondo 2, *La Revuo* 1906, Decembro.

Pri la apostrofado de la artikolo

Se vi ne scias, kiam vi devas uzi la formon *la* kaj *l'*, uzu ĉiam pli bone la formon *la*. La formon *l'* mi uzas ordinare nur post prepozicioj, kiuj finiĝas per vokalo (ekzemple *de, tra*, k.c.); en ĉiuj aliaj okazoj mi uzas ordinare la plenan formon *la*, ĉar alie la senco povus fariĝi ne klara, eĉ la sono ne agraba.

La Esperantisto, 1889, p.24

DU PLUS DU NE ESTAS KVAR

familia
rakonto

s-ino *Florian nad Metuji*, [Sportlaan, 1234, 2566 NN Den Haag, NEDERLANDO]

Antaŭ nelonge vizitis min mia nevo Nikolao kun siaj du filetoj, Menno kaj Eriko, respektive la infanoj havas du kaj duonon jarojn kaj dek monatojn.

Mi vidis la bebon por la unua fojo, mi portis lin en miaj brakoj, li estis peza! Do mi sidigis kun li, li estis dolĉa kaj trankvila, li tute ne ekploris pro mia al li nekonata vizaĝo. En estinta tempo mi havis sep fratinojn kaj fratojn pli junajn ol mi. Eble Eriko sentis tion

ĉe mi. Patro Nikolao kelkfoje demandis al Menno: "Menno, kiom estos unu plus unu?" Kaj ĉiufoje Menno triumfe vokis: "Tri!"

Verŝajne li jam scias, aŭ memoras, ke en la alia mondo du plus du ne estas kvar. La gepatroj ofte al Menno voĉlegas el porinfanlibretoj, kio al li tre plaĉas, li estas jam libroŝatanto.



KIAL KATOJ LAVAS SIN POST MANĜO?

Litova
fabelo

Esperantigis: *Aleksas MASIUKAS*, [prosp. Lenina, 101-26, RUS-183012 Murmansk, RUSIO]

La paseroj flugas ĉirkaŭ la domoj ĉar en la kortoj ĉiam troveblas paneroj aŭ greneroj, kiujn ili ŝatas manĝi.

Foje saltetis pasero en la korto de iu domo, serĉante ion por manĝi. Ĝi estis tute trankvila kaj senzorga. Sed ekvidis ĝin malsata kato, kaŝe alproksimiĝis, eksaltis kaj kaptis ĝin.

— Nun mi bone lunĉos.

— Kion vi diras, altestimata kato? — ekpepis timigita la pasero. — Ĉu vi vere intencas formanĝi min?

— Kial do ne? Ĉu mi devas nur admiri vin eĉ kiam mi estas malsata? - kaj la kato pretis deŝiri la kapon de la pasero.

— Ĉu vi ne hontas, altestimata kato? - denove ekpepis la pasero. Ja vi ankoraŭ ne lavis vin. Ĉu vi, kiu vivas kune kun la homoj, ne scias, ke ĉiu civilizita homo unue lavas siajn manojn kaj poste manĝas?

— Ho jes, tio estas vero - respondis la kato kaj levis la piedeton por viŝi sian buŝon.

La pasero tiumomente eksentis sin libera, etendis la flugilojn kaj forflugis. Kolera la kato ekkriis:

— Ho, duafoje vi ne trompos min. Faru la homoj kiel ili volas, sed mi unue manĝos kaj poste lavos min. Ekde tiam ĉiu kato lavas sin nur post la manĝo.

LA DANKA KANTO

Ludmila Leksina, nia jam konstanta aŭtoro. [Kurskaja regiono, RUSIO]

Mi venis hejmen kaj ekvidis sub pordo frostitajn katidojn. Mi malfermis por ili pordon. En ĉambro la katidoj staris apud mi, levis kapetojn kaj subite laŭte ekmurmuris. Ili rigardis en miajn okulojn kaj kantadis dankan kanton.

Oni kantis al mi kaj "Trinku ĝis fundo", kaj "Ni deziras feliĉon al vi". Estis foje eĉ serenado sub balkono.

Sed la kanto de dankintaj katidoj estis la plej bela.



KONKURSO



Karaj geamikoj!

Ekde tiu ĉi numero en *KOMENCARTO* startas konkurso de diversaj enigmoj. Ni invitas vin aktive partopreni en ĝi. La unuaj tri gajnontoj ricevos libropremiojn, la familianoj de tiuj, kies respondoj okazos plene korektaj, aperos en la rubriko KONKURSO. Ek al via sukceso!


La aŭtoro de la plej interesa el publikigitaj enigmoj ricevos premion fine de la jaro! Do, estu kuraĝaj kaj energiaj, via famo atendas vin!

JANALIEVA Zuhra

[417018 URALSK, Ĵelaevo,
Agregatnaja, 16, KAZAĤSTAN]


LIBROBRETTO

Alistarigu la librojn
sur la breto tiel, ke
rezultiĝu proverbo
pri libroj



KRUCIENIGMO de Stanislav KACKO

[640014, Kurgan,
poŝtkesto 3367,
RUSLANDO]



horizontale

1. mallonga sentenco 2. altaĵo 3. pli-malpli profunda malreliefajo en la tero 4. tago de semajno 5. konstrumaterialo 6. speco de arto 7. astro 8. grandvalora ŝtono 9. fasko da floroj 10. natura kreskaĵo, el kiu oni produktas ŝtofojn 11. monato de jaro 12. unu el formoj de aktiva ripozo

vertikale

1. tiu, kiu praktikadas unu el la belartoj. - rolas en teatro, kino... 2. valora metalo 3. terpeco, kontrasta kun montoj, arbaroj, loĝejoj.. 4. ŝuo 5. frukta arbo 6. vendejo de kuraciloj 7. geometria figuro 8. legomĝardena planto 9. kunigo aŭ kombinaĵo de kemia elemento kun oksigeno 10. satelito de Tero



JUGAJK Vladimir

[172750 Tverskaja obl, OSTAŜKOV, mikrorajon 16-20,]

ANEKDOTOJ pri ĉio kaj nek pri kio

Telefona sonoro:

— Hola, tio estas Olga?
— Ne. Olga ne esta shejme. Kun vi parolas ŝia blukula longkrura fratino.

Virino plendas al la najbarino:

— En mia legomĝardeno oni ĉiujn fragojn piedfrotis.
— Ĉu eble soldatoj?
— Ne, la spuroj ja estas homaj!

— En la pasintan dimanĉon mi kaptis ezokon — jen kiel mia brako!
— Ne mensogu! Tiaj harozaj ezokoj ne ekzistas!

Frazoj pri soldatoj

KONDAKOV Aleksandr, nuntempe servas armeon [184670, Murmanskaja ob, SKALISTY - 1, 1971, ОМІС, в/ч 10672]

- * Soldato dormas - la servo pasas
- * Armeo estas lernejo de vivo — sed sendepende de la poentoj oni restigos vin por la 2-a jaro
- * Kiu estas studento - scias multe, kiu estis soldato - konas vivon.

La ONDO DE ESPERANTO



La Ondo de Esperanto estas ĉiumonata soci-kultura revuo. En ĉiu kajero de *La Ondo* oni povas legi beletron originalan kaj tradukitan, precipe tradukojn el la rusa lingvo.

Ekzemple, jam aperis tradukoj el Aleksandr Blok, Valerij Brjusov, Iosif Brodskij, Miĥail Bulgakov, Anton Ĉeĥov, Fjodor Dostojevskij, Nikolaj Gumiljov, Sergej Jesenin, Vladislav Krapivin, Miĥail Lermontov, Vladimir Majakovskij, Bulat Okuĝava, Boris Pasternak, Aleksandr Puŝkin, Aleksandr Soljenicin, Vasilij Ŝukŝin, Ivan Turgenev, Vladimir Vysockij kaj multaj aliaj.

Proveksemplero ricevebla kontraŭ 2 respondkuponoj aŭ kontraŭ poŝtmarkoj (5 rubloj) ĉe la redakcio: RU-620077, Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.

Ĉina

Radio

Internacia

Esperanto-Sekcio

CN-100866, Pekino, Ĉinio

Horaro

de Esperanta Disaŭdigo de
Ĉina Radio Internacia en

Esperanto

11.00 - 11.30 Japanio, Koreio

41,84 m (7170 kHz); 31,46 m (9535 kHz);

13.00 - 13.30 Sudorienta Azio

25,86 m (11600 kHz); 25,34 m (11840 kHz);

20.00 - 20.30 Eŭropo

40,51 m (7405 kHz); 30,11 m (9965 kHz);

22.30 - 23.00 Latinameriko

30,43 m (6860 kHz); 43,17 m (6950 kHz);

KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Julinha Zoraide
Feijó Pereira*
ĉiuj temoj

Str. COSTA, 159
90.110-270
PORTO ALEGRE
BRAZILIO

Sergej Turko
sperta e-isto, div. temoj

pr. 40 Ĥod Peramohi,
50-140
GRODNO
BY-230026
BELORUSIO

s-ino *Josette Gardas*,
70 jara, kun
komencantoj tutmonde

85 Avenue de Bordeaux,
FR-33220,
PORT SAINT FOY.,
FRANCIO

s-ino *Maria Papa*,
pri ĉiuj temoj

Zahariady IV,
Petmaza
10, T.K. GR-546-22
TESSALONIKI
GREKIO

s-ro *Ramon Figuls*,
pri ĉiuj temoj

c/Corcegas 515 atic
1aEsc.B,
ES.08025
BARCELONA
HISPANIO

s-ro *Olafur
Bjarnason*

precipe pri bahaismo
Bikibero 36,
IS.220
HAFNARFJURDUR
ISLANDO

s-ro *Lwitela M.
Guerchoom*

serĉas korespondan-
tojn por siaj klubanoj
Mao Heloe Klubo,
Poŝtkesto 612,
KIGOMA
TANZANIO

S-ro *Can Zamur*,
38j., laboristo, muziko,
geografio, filmoj.

10, Yeldeqirmont sok,
Tanar str.Kadiköy, TR.
81320 ISTANBUL
TURKIO

grupo de liceanoj
11-15 jaraj,
korespondi tutmonde

p.k. 140,
252164,
KIEV,
UKRAINIO

s-ro *Romano
Bolognesi*
interlingvistiko

Via Misa 4,
401 BOLOGNA
ITALIO

s-ino *Katy Bryfeld*
amika korespondado
tutmonde

C.J.Brandsvej st.,
DK-2400
KOPENHAGEN
DANIO

s-ro *Aquinaldo Soares
de Melo*

70 ja., folkloro, foto
Rue Percilio 28,
Spetioa, BR-23500-000
RIO DE JANEIRO
BRAZILIO

s-ino *Veda Lotuso*
korespondi

poŝtkesto 264
CH.1000
LAUSANNE
SVISUJO

s-ro
Francesco Amermo,
reciproka gastigado

via Pagliani 5,
TORINO
ITALIO

s-ro
Jean Christophe
korespondi

s/c. D.Badiate c/o.
Sonatel, p.k. 69,
DAKAR
SENEGALO

s-ro
*Portela Kampos
Virgílie*

interesejoj: sennacieco
rua Infante Dona
Beatrix 5 r/c
PT.2800 ALMADA
PORTUGALIO

**Internacia Katolika
Unuiĝo Esperantista**
katolikismo

via di Porta Fabrica 15,
I-00165
ROMA,
ITALIO

Fridrik Kristjansson
disvastigo de
Esperanto

Byggdavegi 141,
IS-600
AKUREYRI
ISLANDO

KORESPONDI... listo de dezirantoj korespondi
enhavas pli ol 45 adresojn. Sendu vian anoncon por
senpage enpresigo; aldonu 2 Internaciajn
Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan
eldonaĵon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de
seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.

R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

ŜAKAJ TURNIROJ

Mi deziras organizi ŝakajn turnirojn. En grupo po 8 ŝakistoj.

Petskribon sendi:

665734 Irkutskaja obl, BRATSK, Voinov-Internacionalistov, 11-62, Ĥetĉikov Vladimir

